

U.E.C.I. ANNO 51°



KATOLIKA SENTO

12
rm

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

Anno 51° - 1972

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

KATOLIKA SENTO

n° 11

51a Jaro

Novembro 1972


43a ITALA ESPERANTO-KONGRESO

De la 16a ĝis la 23a de pasinta septembro okazis en Pisa la 43a Itala Esperanto-Kongreso, kies temo estis "Esperanto por la progreso de la popoloj en edukado, scienco kaj kulturo". En ĝi partoprenis proksimume 250 italoj kaj 18 reprezentantoj de 8 eŭropaj landoj.

Dimanĉon, la 17an, je la naŭa matene, antaŭ la sole na inaŭguro de la Kongreso, en la preĝejo de la Kavaliroj de Sankta Stefano havis lokon Sankta Meso en Esperanto, en kiu partoprenis krom la kongresanoj ankaŭ kelkaj lokaj aŭtoritatoj. Celebris kaj predikis p. Albino Ciccanti, kiu je la fino de la Meso benis la Esperanto-flagon, kiun en la antaŭa tago la Urbestro donacis al la Esperantista Grupo de Pisa. Dum la meso ĥoro el gejunuloj kantis plurajn kantojn en la internacia lingvo.

Tuj poste la kongresanoj pozis por komuna fotografado ĉe la ŝtuparo de la apuda palaco de la Kavaliroj.

Je la deka kaj duono, en la aŭlo de la Universitato, en ĉeesto de pluraj aŭtoritatoj, disvolviĝis la solena inaŭguro de la Kongreso. La gravecon de la ceremonio akcentis la bonveniga parolado de la Urbestro, kiu interalie certigis, ke la komunuma administracio apogos laŭ sia ebleco la leĝproponon por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Post la saluto de la reprezentanto de la universitata rektoro, elokvente alparolis la kunvenintojn deputito Meucci, unu el la parlamentanoj, kiuj subskribis la leĝproponon. Inĝ. Giordano Azzi, Prezi-



danto de la Itala Esperanto-Federacio, esprimis siajn varmajn dankojn al la urba magistrato, al la universita to kaj al la diversaj instancoj, kiuj ĉiumaniere helpis por la bona aranĝo de la Kongreso. Poste li disdonis la diplomojn al la honoraj membroj de la Federacio: prof. Alessandro Bausani, prof. Elio Migliorini, deputito Franco Nicolazzi kaj prof. Giuseppe Tramarollo.

Sekvis la salutoj de la reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj el Aŭstrujo, Francujo, Germanujo, Britujo, Jugoslavio, Pollando, Svislando kaj Hungarujo, kaj de pluraj fakaj asocioj.

Post deklamado de poeziaĵo de Luigi Minnaja omaĝe al la gastiganta urbo, d-ro Mario Dazzini faris la festparoladon en itala lingvo, turniĝante precipe al la aŭtoritatoj, por ilin informi pri la altaj atingoj de Esperanto ankaŭ ĉe universitata nivelo.

London, la 18an matene, s-ino Ursula Grattapaglia parolis pri la grava, serioza laboro farita de la esperantistoj ĉe la Olimpiko en Munkeno, kie la ambasadoro de Aŭstralio, Ralph Harry, prezentis sian libreton "Esperanto, lingvo de la sporto". Dumil ĵurnalistoj estis invititaj al gazetara konferenco, kiu bedaŭrinde ne

povis efektiviĝi, ĉar ĝuste en la nokto ĝin antaŭanta okazis la terura murdo de la israelanoj. Nun oni estas jam faranta la antaŭpreparojn por la venonta Olimpiko, kiu disvolviĝos post kvar jaroj en Montreal.

Sekvis parolado de d-ro Menabene, kiu, klariginte la celojn de la Eŭropa Federalista Esperantista Movado, anoncis, ke ĝia unua kunveno okazos en Bruselo dum Pentekosto de 1973a, kaj ke la adreso de la itala sekcio troviĝas ĉe la Esperantista Grupo de Sondrio, en via Caimi, 54.

Posttagmeze kunvenis la Ĝenerala Akademia Konsilantaro de la Itala Instituto de Esperanto, de kiu estas unuanime akceptitaj kiel ordinaraj membroj: Corsetti Renato, Legnani Maria Cristina kaj Mignosi Antonino, kaj kiel membro instruisto Sartorio Bianca. Poste la asembleo de la Instituto aprobis la raportojn moralan kaj fincan, kaj diskutis pri la programo disvolvota de la Instituto mem kaj de la unuopaj katedroj.

Je la dekoka horo la kongresanoj, antaŭataj de la Esperanto-flago kaj de laŭrokrono, iris procesie de la Kongresejo ĝis la inaŭgurota Zamenhof-strato. Tie la skabeno pri turismo kaj stratnomado esprimis la plezuron de la urbestro kaj de la civitanoj pro la dediĉado de nova strato al la aŭtoro de Esperanto, kies ĉefa celo estis la interkompreniĝo kaj interfratiĝo de la popoloj; kaj pola samideano dankis pro la honoro, kiun la urbo rezervis al lia eminenta samlandano.

Post la vespermanĝo, en la halo de la Komerca Ĉambro okazis la raporto pri la literatura konkurso, kun disdonado de la medaloj kaj deklamado de la premiitaj verkoj. Pri originala poezio gajnis la unuan premion Gianluigi Gimelli (Italujo) per la poeziaĵo "Mi mem"; la duan premion Kjell Walraamoen (Norvegujo) per "Floroj apud abismo"; la trian egalmerite Julius Balbin (Usono) kaj Adriana Ravoni (Italujo). Pri originala prozo estis

asignitaj la dua premio al Nevena Nedelcevav (Bulgarujo) kaj la tria al Pensa Ruseva Batoeva (same el Bulgarujo); laŭdan mencion ricevis Lina Gabrielli (Italujo).

Post la disdonado de la premioj oni projekciis la plej lastan Esperant-lingvan kolorfilmon de FIAT.

En la postaj tagoj la laboroj de la kongreso dividiĝis laŭ du studgrupoj, respektive pri la temoj: "Instruado de lingvoj en lernejoj", kiun direktis d-ro Renato Corsetti, kaj "Interregionaj Komitatoj kaj lokaj Societoj: ilia aktiveco en la kadro de la IEF-laborplano", kiun direktis Giuseppe Grattapaglia kaj Riccardo Pinori.

La 19-an matene okazis ankaŭ la kunveno de UECI, kiun ĉeestis 26 membroj kaj deko da nemembroj. Post la enkondukaj vortoj de la Prezidanto de UECI, p. Albino Ciccanti, kaj klarigoj de la Ĝenerala Sekretario, s-ro Franco Galbusera, estis pridiskutitaj diversaj temoj, inter kiuj: 1) la ebleco aranĝi la venontjaran UECI-Kunvenon en Trento dum la dua dimanĉo post Pasko; 2) la starigo de la mozaika panelo "Nia Sinjorino de la Espero" en Nazareto; 3) la pretaj Mestekstoj por la dimanĉoj kaj festotagoj; 4) la bulteno de UECI, "Katolika sento" (enhavo kaj diskonigo); 5) la elekto de la nova estraro okaze de la venontjara UECI-kunveno.

La vesperoj de dimanĉo, merkredo kaj ĵaŭdo estis dediĉitaj al distraj artaj programoj, kaj tiu demardo al la kongresa balo.

Dumtage la itala esperantista junularo, disdonante demandarojn, intervjuis la publikon surstrate en Pisa kaj en Viareggio.

Mardon posttagmeze, enkondukita kaj direktita de d-ro Carlo Minnaja, havis lokon vigla debato pri la temo de la Kongreso. En ĝi partoprenis pluraj ĉeestantoj per demandoj, per raportoj pri faritaj spertoj kaj per sugestoj.

Merkredon matene kunvenis la membroj de la Inter-

nacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), al kiuj faris detalan raporton pri ĝia agado la Ĝenerala Sekretario, d-ro Mario Dazzini, aparte reliefigante la gravecon de la eksperimento de instruado de Esperanto, kiun partoprenas kvar aŭ kvin lernejoj en ĉiu el la landoj: Aŭstrujo, Bulgarujo, Italujo kaj Jugoslavio. Pluraj el la kunvenintoj parolis pri propraj spertoj en unuagradaj lernejoj.

Posttagmeze, en la fama placo de la Katedralo (nomata Kampo de la Mirakloj pro la rave majestaj konstruaĵoj: katedralo, baptejo kaj kliniĝinta turo) la kongresanoj flugigis al la ĉielo centojn da diverskoloraj balonetoj kun la vorto "Esperanto", kaj al kies ŝnureto estis ligita karto kun fratecmesaĝo kaj demandaro respondota de la personoj, kiuj ilin trovos post la refalo teren.

Jaŭdon matene, en la ferma kunsido la gvidintoj de diversaj kunvenoj raportis pri la disvolviĝo de la debatoj; oni legis leteron de la ĉefepiskopo de Pisamons. Benvenuto Matteucci, kiu per varmaj esprimoj bondeziris plenan sukceson al la Kongreso, substrekante la grandan valoron de la Esperanto-movado; kaj oni aprobis la kongresan rezolucion, kiu fermiĝas per invito al la ŝtataj instancoj favori la enkondukon de Esperanto, rimedo je socia utileco, en la lernejajn programojn sur baze de la nunaj leĝoj kaj en la kadro de la farataj reformoj.

En la du lastaj tagoj, vendredo kaj sabato, disvolviĝis du interesaj tuttagaj ekskursoj respektive al la Toskania Insularo, kaj al Vinci, Certaldo kaj S. Gimignano.

OKAZE DE LA Itala Eŭkaristia kongreso, celebrita en Udine, pri kio ni donas kelkajn informojn en ĉi tiu bulteno, ni ĝojas komuniki, ke ankaŭ UECI partoprenis. Fakte, laŭ invit-cirkulero subskribita de la IKUE prezidanto p. Ferdinando Longoni kaj de Trevisani Pri mo por la Grupo "Espero-Friuli", la 10-an de sep - tembro estis oferita sankta meso en Esperanto en la preĝejo de la Pureco, en la placo de la katedralo de Udine. Pri tiu simbola partopreno de la tutmonda katolika esperantistaro raportis ankaŭ gazetoj.

LA 9a NUMERO DE "Espero Katolika" raportas vas te pri la 34a IKUE-kongreso: 24 paĝojn. El ĝi relie - fiĝas kiom grava estis tiu kongreso, kvankam ĝi ne ha vis multajn partoprenantojn. La ampleksa raporto pre zentas informojn kaj proponojn, montrante, ke la ak - tuala direkcio de IKUE laboras serioze. La revuo, kiu sin prezentas agrable, kun siaj fotoj kaj kun sia varia enhavo, estas do invito por plenkonfida aliĝo.

POR LA MOZAIKO honore al N.S. de la Espero en Nazareto:

Antaŭa sumo:	£	308.360
F. Miuccio (Messina)		5.000
A. De Salvo (Romo)		2.380
pere de p. Longoni (Milano)		7.000
pere de p. Ciccanti (Rimini)		41.000
M. Serratrice (Padovo)		4.000
E. Chiorboli (Milano)		1.000
Ĝis nun entute:	£	368.740

ROMA ESPERANTA VOĈO

n^o 111

GRAVA EVENTO por Italujo estis la oficiala vizito de la itala prezidento Leone al la Papo, la 22an de septembro. Kvankam ĝi disvolviĝis laŭ preciza protokolo, tamen la tuta ceremoniaro estis multe pli simpla ol iam, laŭ la demokrata gusto de nia tempo, kaj la ĉeesto de la familio de la prezidento donis al tiu vizito etoson de afableco kaj familiareco. La Papo akceptis la prezidenton, dekoritan de la "koliero de la Pia ordeno" kaj tuja havis kun li unuhoran apartan interparolon. Poste eniris lian studoĉambron ankaŭ la familianoj kaj la sek-vantaro. Tiam Paŭlo VI adresis siajn vortojn al la prezidento, dankante lin pro la delikata intenco montrita, ĉar antaŭ ĉiu oficiala vizito ekster Italujo, li volis unue viziti la superan paŝtiston de tiu katolika eklezio, kiu en Romo havas sian centron. Kaj laŭdante lian kristanan kaj Italian senton, la Papo plilarĝigis sian rigardon al la tuta Italujo, tiel digne reprezentata de la prezidento, kaj esprimis sian konfidon, ke tiu harmonio, laŭjure baziĝanta sur solenaj paktoj, donu al la itala nacio pacon kaj prosperon. La Papo ne preterlasis la okazon, por certigi, ke la Sankta Sidejo estas ĉiam pretapora la revizio, kun la kompetantaj organoj de la itala ŝtato, de tiuj normoj de la Traktato kaj de la Konkordato, kiuj povas montri ĝi ne plu taŭgaj pro la ŝanĝiĝemaj cirkonstancoj. Ĝuste pro sia granda amo al Italujo la Papo deziras al Italujo tiun ordon kaj tiujn familiajn morojn, kiujn la Kristeklezio ĉiam instruis, kaj pri kiuj la itala nacio estis ĉiam tradicie fidela, kaj modelo al la aliaj. Post la noblaj vortoj de la prezidento, responde al la Papo, okazis la

tradicia interŝanĝo de donacoj. Prezidento Leone tuj post la vizito al la Papo, vizitis aparte la ŝtatan sekretario, kard. Villot, kaj descendinte en la vatikanan bazilikon, li preĝis antaŭ la tombo de la unua apostolo.

NOVAĴO PRI NIAJ romaj renkontiĝoj: Ekde novembro la ordo: meso kaj kunveno - estos ŝanĝita. Je la 10.30 h. de ĉiu dimanĉo ni havos unue kunvenon (P.S.M. Maggiore, 7) ĝis la 11.30, kiam okazos la meso (Baz. S.M. Maggiore).

ABONINTOJ POR 1973a: Italujo: Krom multaj Esperanto-grupoj: Bolonjo: J. Lercaro; Cesena (FO): T. Girrotti; B. Benini; Città del Vaticano: Segreteria di Stato; A. Bugnini; Mantova: N. dell' Aringa; Mari M.L.; Messina: F. Miuccio; Napolo: E. Mingo; T. Restaino; Padovo; C. Minnaja; M. Serratrice; Porretta Terme (BO): Pivari Claudio; Rho (MI): N. Minnaja; Romo: I. Zuzek; L. Patrizi; L. Minnaja; F. Fresco; A. Biani; N. Pagliari; E. Migliorini; Ternengo (VC): G. Cerutti Vivo (SI): O. Dinetti; Voghera (Pa): C. Carena; Aŭstrujo: IEMW; K. Dürschmid; L. Oberlechner; Hungarujo: P. Balkanji; J. Misi; I. Ragonza; I. Dobák; J. Nagy; I. Vagò; M. Vari; F. Casar; Bulgarujo; J. Vasilij; Japanujo; Kat. E. J. A. Madagaskaro; Kat. E. A.; Nederlando: Heroldo de E.; Ned. Kat. UEA; Pollando: A. Mackiewicz; W. Majewski; T. Kuczkiewicz; K. Nusia; T. Nowakowski; Z. Klopocka; M. Sygnarski; J. Kropiewnicki; Lech Paluch; Romanujo: J. B. Keles; Sovetunio: Z. Korn; J. Gediminas; Suomio: A. Kurikka; Thajlando: M. Perray; Usono: S. Klimowic.

Entute: 235.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS aliĝi, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen deziras la bultenon, petu de p. Jacobitti senpagan sendadon.

El la Katolika Eklezio

LA 18a EŬKARISTIA itala kongreso, kiu estis celebrita en Udine de la 10a ĝis la 17a de septembro estis evento, kiu longtempe restos en la memoro de la italaj fideluloj. Oni ne povas en nia raporteto doni resumon de la preparlaboroj, kiuj plenumigis tri jarojn; kaj eĉ de la disvolviĝo de la Eŭkaristia kongreso. Ĝi celis publikan kredateston je la sakramento de unueco pere de la reciproka konsento inter hierarkio, klerikaro kaj fideluloj, unuvorte, en la itala eklezio, ĉiam necesas, sed precipe dum nia kriza epoko. Kioman religian senton de la kristanaro la kongreso vekis, oni povas mezuri ankaŭ el la dudek, tridekmil komunioj, kiuj ĉiutage oni disdonis al la pilgrimantoj. Kiam la Papo alvenis, ili estis cent okdek mil, venintaj ne nur de multaj italaj urboj, sed ankaŭ de aliaj nacioj, per 500 aŭtobusoj, 20 specialaj trajnoj, miloj kaj miloj da aŭtomobiloj. Oni rigardis kiel feliĉan solvon, ke la Papo, antaŭ ol li iros al Udine, haltis en Venecio kaj Akvilejo, ĉar se la amaso de la tieaj loĝantoj, kiuj alkuris al la Papo, estus alfluintaj kune al Udine, la urbo sendube estus

travivanta tre malfacilan situacion. Oni admiras la eksterordinaran eltenon de la Papo, kiu de malmultaj tagoj atingis 75 jarojn. Je lia alveno oni konstatis lian palecon, lian mallaŭtan voĉtonon, ne kutiman. Sed dum la dek ok horoj de lia vojaĝo al la kongreso, li trifoje flugis per aviadilo, dufoje per helikoptero; dufoje vojaĝis per motorboato kaj per aŭtomobilo. Li eĉ plenumis mallongan laguniradon per gondolo. Li vizitis plurajn preĝejojn, partoprenis en du solenaj akceptoj, suriris kaj malsupreniris centojn da ŝtupoj. Li faris sep paroladojn: du en Venecio, unu en Akvilejo, kvar en Udine; ricevis la individuan omaĝon de preskaŭ mil aŭtoritatoj civilaj kaj religiaj. Persone li disdonis centon da komunioj, kaj centon da konfirmaciaj sakramentoj. Kaj dum sia lasta alparolo al la klerikaro, li havis ankoraŭ tiom da freŝeco, ke li flankelasis la skribe preparitan paroladon por improvizi dialogonkun la aŭskultantoj. Oni insiste volis malpezigi por li la programojn, sed li ne konsentis. Ĉiuj, tiun vesperon estis morte lacaj; li ŝajnis pli freŝa ol je la mateno.

LA INTERNACIA TEOLOGIA KOMISIONO kreita de Paŭlo VI la 28an de aprilo 1969a, laŭ sugesto de la Dua Vatikana Koncilio "por doni fortikan helpon al la Sankta Sidejo, kaj aparte al la Kongregacio por la kredodoktrino, donis jam pozitivajn fruktojn. Ĝi fokusigis jam multajn el la plej gravaj problemoj de la dogma kaj morala sferoj. Pri la paŝtisteca vivo de la sacerdoto, ĝi prezentis jam vastan studon, dum la ekzameno de kelkaj flankaj problemoj ankoraŭ daŭras, kiel la deveno el la apostoloj, la valoro de la oficoj ĉe aliaj konfesioj, la ekzakta naturo de la komuna sacerdoteco, la virinaj ekleziaj servoj. Oni prilaboris ankaŭ studon pri "unueco de kredo kaj teologia plurismo" por bazo de la plena sesio. Estis ankaŭ sonditaj la doktrinaj fontoj de la episkopa kolegeco, kvankam ĝi

tie oni ne atingis sufiĉajn konsentojn. Oni ekirigis kritik^u analizon pri la "metodoj de la morala konscienco" kaj pri la "teologio de la espero". Naskiĝinte ekde la komenco de la 2a Vatikana, la projekto de teologia organizo je internacia nivelo, tuj progresis. Tion favoris la sperto de utilo de dialogo kaj konsultado inter la eklezia instrurajto kaj teologoj. Jam la Koncilio atentigis pri la neceso de prezentado de la katolika doktrino kun vesto pli konforma al la moderna pensmaniero kaj respondanta al la problemoj estiĝantaj el kontakto kun la realo de diversaj landoj kaj el la komparo de la diversaj starpunktoj rilate al la sama kredo. Inter la rozo de pli ol 200 nomoj, estis elektitaj 30 teologoj por tiu komisiono. Dum la unua plena kunsido la papo volis precizigi ĝiajn celojn: defendi la dian popolon el tiomaj, el la tro multaj agresantaj eraroj, kiuj atakas la diajn kredoverojn; prezenti la aŭtentikecon de la dia nivelo, kvankam ĝi superas nian komprenemon, "per vortoklareco, stilfreŝeco, karitataro". Kvankam Paŭlo 6a admonis pri nepra neceso gardi en la katolika doktrino la internan veron, li parolis eksplicite pri "plurismo". La 1971a jaro montris novan evoluon de la organizo, kiam kun la konsento de la papo, oni publikis la studaĵon pri la paŝtisteca sacerdota vivo, poste disdonata al ĉiuj Sinodaj Patroj. Oni same publikis la teologiajn aspektojn de la "celibato" kaj la sakramentan karakteron de sacerdoteco, kiel ili estis resumitaj en la konkludaj dokumentoj. Post tio, oni proponis eldoni aliajn publikiĝojn, eĉ se ili intencas esprimi nur opiniojn de iu aŭ alia laborgrupo. La nova plena asembleo de la internacia komisiono pri teologio, kiu etendiĝis de la 5a ĝis la 11a de oktobro, kun la preciza temo pri "plurismo en la teologio" estis rigardata kiel fundamenta en la direkto de la postkonciliaj ekleziaj agadoj. Kvankam tre valoraj, ĝiaj konkludoj, kiuj de-

vos esti aprobitaj de la Papo antaŭ publikiĝo, neniel ha
vos dogman aŭtoritaton.

LA 15an DE AUGUSTO per du "Motu-proprio"-j (papaj memdecidoj) estis dekretita nova regularo pri la mino-
raj ordinoj kaj pri diakoneco. Ĉar la unuaj estis eklezi-
-devenaj, dum diakoneco kun sacerdoteco estis starigi
taj de Kristo, kaj pro tio ili estas "sakramentoj", la ek-
lezio abrogaciis, krom tonsuro kaj subdiakoneco, an-
kaŭ la du unuajn minorajn ordinojn, t.e. "ostiariaton"
(pordista ofico) kaj "ekzorcistaton", kiuj, pro la evo-
luo de la praktiko, ne plu respondis al la origina insti-
tucio. Restis lektorado kaj akolitado, sed nur kiel ser-
voj ĉe altaro. La rolo de la akolito estis rimarkinde
pli riĉigita: li povos en kelkaj okazoj disdoni la sank-
tan Komunion, kaj ekspozicii publike la dian Sakramen-
ton por adorado. Prezente dum preskonferenco la
du dokumentojn, patro Dezza rimarkis, ke nenio mal-
helpas, ke virinoj estos ankoraŭ komisiitaj pri publi-
kaj legadoj dum la liturgiaj celebroy, kiel jam ili faras
ekde kelkaj jaroj laŭ la ĝeneralaj dispozicioj de la no-
va roma mesalo, eldonita la 3an de aprilo 1969; kaj ke
ne estas necesa, por ĉi tiu servo, formala kanona in-
vestituro fare de la episkopo. Kiel ankaŭ, ke, laŭ la
kurantaj normoj, la episkopoj ĉiam povas peti de la S.
Sidejo rajtigojn, por ke ankaŭ virinoj disdonu, kiel ek-
sterordinaraj diservistoj, la sanktan Komunion.

MONS. ALBINO LUCIANI, patriarko de Venecio dek-
laris: "Iu Semajna gazeto, kiu sin kvalifikas katolika,
sufiĉe legata ankaŭ en Venecilando, ĝuste dum la ta-
goj de la eŭkaristia kongreso, havis pri Eŭkaristio kel-
kajn asertojn, kiujn oni ne povas akcepti. Ni mencias
nur kelkajn el ili: 1. "Neniu kristano - tiu gazeto di-
ras - nek katolika, nek ortodoksa nek protestanta pri-
dubas la realan ĉeeston de Jesuo en la Eŭkaristio". --

Konsente por ortodoksoj kaj katolikoj - ni rimarkas - . Pri protestantoj ne estas tamen la sama afero. Lutero asertis ke la korpo kaj la sango de Kristo ĉeestas, ja en la Eŭkaristio, sed kune kun la pano; por Zuinglio Kristo nur en la kredanto estas ĉeestanta, kaj la pano nur signifas tiun ĉeeston; por Kalvino, la vespermanĝo, celebrata kun kredosento, igas Kriston ĉeestanta nur en la animo de la kunmanĝantoj. En 1500a la kontrastoj inter ĉi tiuj tri kredodirektoj fariĝis ne supe rebraj kaj malebligis la unuiĝon de la protestanta movado. Hodiaŭ oni konstatas, verdire, tie kaj tie kelkajn alproksimiĝojn eĉ kun la katolikoj. Bedaŭrinde ni estas ankoraŭ tro distancaj de unika kredo pri la reala ĉeesto. En Udine la sabato tago de la kongreso estos dediĉata al la ekumenismo; krom kun la ortodoksoj ni preĝos fervore ankaŭ kun la protestantaj fratoj. Tamen ĝuste pro tio, ke ni ankoraŭ ne akordiĝas, ni ne povos celebri kune la Eŭkaristion, kaj ni nur kontentiĝos pri "komunecaj preĝoj", petegante de Dio la gracon, ke ni iam povos partopreni en la sama eŭkaristia manĝotablo.

2. - "La terminoj uzitaj de la Tridentino "substanco" de la pano kaj de la vino kaj "transsubstancigo" devos esti forlasitaj, - laŭ la dirita gazeto - ĉar ili devenis de la aristotela filozofio". - Konsente pri la aristotela deveno de la nomoj. Tamen la instrurajto de la eklezio ne celas pri filozofiaj problemoj; se ĝi uzas filozofiajn terminojn, ĝi uzas ilin, kiel esprimojn de komuna, simpla, elementa filozofio, sen kiu oni ne povas esprimi iun ajn penson. Temas pri filozofio, kiu ne postulas specialajn studojn, por esti komprenata, kiu estas subdirita en ĉiuj problemoj, kaj sen kiu tiuj problemoj neniun sencon havas. Katolikoj ja scias, ke la difinoj de la tridentina koncilio estas de Dio revelacitaj. Pro tio la terminoj uzitaj estas utila ŝlosilo por

kompreni la koncilion kaj por forigi danĝeron de devotiĝo el la diaj veroj. Oni ne povas ilin forlasi, se oni ne trovas aliajn pli taŭgajn por esprimi la koncernajn verojn, neniel ŝanĝante ĉi tiujn.

3. - "Transsubstancigo - aldonas la gazeto - estas falsuĝo por multaj kredantoj. Ili ne kapablas kredi je tio: kiu, fakte, povas kompreni tiun vorton?" - Kelkaj ne kapablas kredi je Triunuo, je virgeco de Maria, je aliaj revelaciitaj veroj, kiuj estas supre (ne kontraŭ) nia komprenpovo. Ĉu oni devos pro tio rifuzi ilin? Rilate al la kompreno, nekomprenebla estas la mistero, ne la vertoj uzitaj por esprimi, kvankam neperfekte, tion. Ni ne konas, kiel Dio povas esti kune unu kaj tri persona; ni tamen bone komprenas la vortojn "unueco" kaj "triuueco". Pri nia afero, transsubstancigo signifas aliĝon, de unu substanco al alia substanco. Ĉiu komprenas, kio estas aliĝo - sed avertas la Tridentino - ĉi tie la aliĝo estas mirinda kaj unika: ne temas pri la kutima ekzistanta objekto. kiu aliĝas al alia, antaŭe ne ekzistanta (la ligno, brulante, fariĝas cindro: la akvo fariĝas hidrogeno kaj oksigeno, ktp.) sed pri unu aŭ multaj panoj, kiuj, konsekritaj, fariĝas unu ne aliĝinta Kristo. La ŝanĝo ne okazas laŭ nivelo de videblaj objektoj, sed de substanco. "Substanco" estas ankaŭ filozofia termino, sed facile komprenebla; ĉar ĝi signifas "Tio, kio estas sub", kion tuŝado, aŭdado, vido aŭ lenso, aŭ bisturio neniam povos malkovri, sed kio ekzistas en ĉio, kiel bazo aŭ subteno de la fenomenoj de la objekto mem. Kiam oni estas kvindekjara, la ĉeloj de nia korpo entute kaj multfoje renoviĝis ekde la tempo de nia infanaĝo; ŝanĝiĝis staturo, pezo, haŭtkoloro. Tamen la korpo estas la sama ol la iama pro io, kio, malgraŭ la multaj aliĝoj, restis ne ŝanĝita, tio estas la substanco. Do, ni komprenas kion signifas: "la pano ŝanĝiĝas al la korpo de Kristo je nura nivelo de ne videbla sub-

stanco". Ni ne komprenas tamen "kiel" ĉi tio povas okaz^o. Ni ne povas trovi taŭgajn ekzemplojn, ĉar ĉiuj aliĝoj, kiuj okazas ĉirkaŭ ni estas la kontraŭode ĉi tiu. Same, ni bone komprenas, kion signifas: "Maria estas samtempe patrino kaj virgulino". Tio, kion ni ne komprenas, estas "kiel" ĉi tio povas okazi, kaj ni ne trovas ekzemplojn, ĉar ĉiuj aliaj virinoj, fariĝante patrinoj, ĉesas esti virgulinoj.

Ankoraŭ el tiu gazeto: 4. - "La transsubstancigo povas esti diskutata; ĝi ne estas kredobjekto, sed skola interpretaĵo". - Kiel, se tio estis klare deklaritade la tempoj de sankta Ambrozo, de la Konstanca kaj Tridentina koncilioj? Eĉ la nederlandaj episkopoj en sia letero de 27a de aprilo 1965 deklaris, ke devas esti firme tenataj la "dogmoj" de la aliĝo de panokaj de vino al la korpo kaj al la sango de Kristo". Akceptinte la dogmon, oni povas peti: Ĉu la termino "transsubstancigo" estas taŭga por esprimi tion? La tridentina koncilio jam faris tiun demandon, kaj respondis: (DS 1962): "Tiu termino estas tre taŭga". Kelkaj teologoj obĵetas: - ĉi tiu respondo estas metita en la koncilian difinan tekston nur parenteze; pro tio ĝi estas grava doktrino, sed ne nerenversebla. - Oni povas ankaŭ konsenti pri tio; tamen la termino devas esti akceptata. Paŭlo 6a, rilatante al Pio 6a kaj al Pio 12a, akcentis la neceson "gardi ekzaktan parolmanieron" kaj sekvi tiun vortmanieron, kiu ofte fariĝis identigilo kaj insigno de la kredortodokseco ("Misterium fidei"). La Papo konsentas, ke "tiujn formulojn oni povas ekspliki pli klare kaj logike, neniam tamen donante signifon malsaman ol tiun, pri kiu ili estis uzitaj, tiel ke, prilumigante la komprenon de la kredo, oni tute ne aliigu la kredon mem".

5. - "Anstataŭ transsubstancigon - asertas ankoraŭ la dirita gazeto -, pli bone estas diri transceligon".

- Tiu estas la termino de la "nederlanda" teologio. In ter Nederlando kaj Paŭlo 6a, prefere estas resti kun la Papo, kiu diris, ke "la vorto transceligo" ne povas esti proponata, se per tio oni volas ekskludi la transsubstancigon. Sed, post kiam okazis transsubstancigo, la akcidentoj de la pano kaj de la vino sendube akiris novan signifon kaj novan celon, ĉar ili ne plu estas la kutima pano kaj la kutima trinkaĵo, sed la signo de spirita nutraĵo. Sed ili akiras novan signifon kaj novan celon ĝuste pro tio, ke ili akiris novan realon, prave nomatan ontologia. Aliajn rimarkojn oni povus fari kontraŭ la dirita semajna gazeto. Sed sufiĉas. Ni nur aldonas, ke tiu ekzemplo estas tipa: oni volas fari "teologion" kontraŭstarante la instruadojn de la eklezio. Ĉu ĝi estas vera teologio?"

IUTAGE, PRINTEMPE de 1578a laboristoj elfosadis ekster la muregoj de la antikva Romo, kiam iliaj pioĉoj subite aperigis vastan subteran kavernon. Mireginte, ili malsuprengrimpis kaj alvenis en senfinajn tunelojn kun surskribaĵoj kaj brilkoloraj bildoj ĵe la vandoj. Ili estis malkovrintaj nekonatan antikvan mondon! La sciigo, ke oni retrovis la antikvan urbon de mortintoj, forgesitan de jarcentoj, fulmorapide trafugis Romon, kaj ĉiuj alkuris vidi ĝin. La Papo interesiĝis pri la malkovro, kardinaloj kaj scienculoj rapidis viziti kun torĉoj la mallumajn katakombojn. Ankoraŭ hodiaŭ eliras forta sorĉo de tiuj antikvaj tuneloj, plenaj de kortuŝaj memoraĵoj. Tion montras ĝiaj preskaŭ 500.000 vizitantoj, apartenantaj al ĉiuj religioj kaj rasoj, kiuj ĉiujare descendas en tiujn emociajn lokojn. La plej granda kaj interesa katakombo estas tiu de S. Kalisto, ĉe la fama "Via Appia". Naŭ Papoj de la tria jarcento estis entombigitaj en ĝi. Salezanaj religiuloj gvidas la piajn pilgrimantojn dum 25 minuta esplorado, parolante dekvinon da lingvoj. Ĉe

la tomboj elhakitaj unu apud la alia sur la vandoj de la mallarĝaj galerioj oni povas legi kun la nomoj ankam la metiojn de la sepultitoj: forĝisto, linoteksisto, tanisto, tajlorino, ĝardenisto, porkpaŝtisto kaj eĉ "elephantarius", t.e. eburskulptisto. Sed oni trovas ankaŭ riĉekipitajn tombojn sub arko aŭ volbo kun freskoj, kaj tomboĉelojn por apartaj familioj. Ne malproksime de la sankt-kalistaj katakomboj disbranĉiĝas aliaj, nomitaj: S.Domitila kaj S.Sebastiano. Ĉi tiu lasta, kiu troviĝis "ad catacumbas" (ĉe malalta valo), donis tiun epiteton al ĉiuj similaj mortinturboj de la frua kristana tempo. Dum la supre diritaj troviĝas ĉe la sudo, la katakomboj S.Agnesa kaj S.Priscila etendiĝas norde de Romo. La studoj pri katakomboj reĝustigis plurajn erarajn opiniojn pri ili. La katakomboj ne estis elfosataj nur de persekutitaj kristanoj; ili estis konstruataj kun konsento de la civilaj aŭtoritatoj, ĉar la roma leĝo ne permesis entombigojn interne de la urbo. Ĉar la paganoj kutime cindrigis kadavrojn, ili bezonis malmultan spacon por siaj urnoj: ses kvadrataj metroj povis ricevi eĉ mil cindruojn, sed nur 30-40 korpojn de kristanoj, ĉar, pro respekto al korpo, kiu estis sanktigita per la Sakramentoj, oni sepultis tiujn integraj. Tiel la kristanoj konstruis etaĝojn sub la tero, konsistanta el vulkanaj deponaĵoj, mola kaj malseka, kiu tamen en la aero solidiĝas. Oni kalkulas ke la longeco de la katakomboj estas entute 145-160 kilometrojn, kaj ili povas malkaŝi ĝis unu miliono da tomboj. Ne ĉiuj ornamaĵoj, kiel palmobranĉoj, kaj kolomboj, estas signo de martirtomboj. Kaj boteletoj ne ĉiam konservis sangon, kiel oni supozis, sed parfumajn likvaĵojn. Depost la paco donita de imperiestro Konstanteno al la eklezio, la katakomboj ĉiam malpli estis uzataj kaj vizitataj, tiel ke iom post iom ili estis forgesitaj. La remalkovro altiris la atenton

ne nur de fideluloj, sed ankaŭ de scienculoj, kiuj sin dediĉis al ilia esploro kaj al rebonigo, -ĉar kelkaj tuneloj estis renversitaj de tertremoj aŭ inunditaj. Nun tempe oni retrovis, supozeble, ĉiujn romajn katakombojn aŭ almenaŭ oni konas ilian situon. Dum la milito, bombo hazarde remalkovrigis novan katakombon tute nekonitan kaj en neŭiu dokumento menciitan. Ĝi enhavis la plej belajn kaj konservitajn freskojn, ĝis nun trovitajn. Vizito al katakomboj estas vera spirita travivaĵo. Ili invitas al silento kaj al medito, sed fine oni perceptas iam plezuron, kvazaŭ oni estis trovintaj la plej pacplenan preĝejon. Oni povas sperti la veron de iu sentenco, skribita sur iu katakombmuro antaŭ milkvinent jaroj: "En ĉi tiu malhelo estas lumo, el ĉi tiuj tomboj leviĝas muziko". (trad. E.M.)

36 ANOJ DE L'SANKTPATRA INSTITUTO por eksterlandaj misioj en Milano elveturos la plej proksimajn tagojn al la misioj: 20 sacerdotoj por Azio, 4 por okc. Afriko, 11 por Amazonio, 1 por Brazilo. Krome, por labori en Bengalujo elveturos 7 sacerdotoj kaj 3 fratoj. 16 junaj italoj el Toskanujo elveturis en ĉi tiuj tagoj al la diocezo Dodoma en Tanzanio, kie ili laboros ĉe konstruoj. La unua grupo estos finlaboranta la komencitan pasintjare konstruadon de l'hospitalo; la dua helpas ĉe la konstruado de l'misia centro, garnita je ambulatorio kaj orfejo. La junaj volontuloj apartenas al la laikaro en la servo al misioj.

(Fr. Walas)

LA SALEZANOJ baldaŭ havos, inter la aliaj socikategorioj, ankaŭ tiun de permanentaj diakonoj: tion rajtigis per freŝdata reskripto la porreliĝia roma kongregacio. La neceso inkludi en siaj vicoj ankaŭ la permanentajn diakonojn, estis sentata ĉefe de la salezanaj parokoj (kiuj estas 665 kun sume 7.440.000 loĝantoj) kaj de la salezanaj misioj (kiuj havas 2.500 religiulojn

en 318 centroj, laborantajn inter 15 milionoj da perso
noj el ĉiuj kontinentoj).

"EKZISTAS IU, kiun ni aŭskultas kun granda atento, kaj tiu estas Paŭlo 6a". Tion deklaris muzulmana intelektulo, membro de la centro por islamaj studoj de Tombukto, sude de Saharo, okaze de vizito al lia instituto fare de pastro Jaques Lanfry el la kongregacio de la Blankaj Patroj kaj membro de la sekretariato por nekristanoj. Ankaŭ aliaj docentoj de la sama instituto deklaris, ke ili aprecas iniciatojn celantajn novajn kun labormanierojn kaj unuiĝproponojn inter ĉiuj kredantoj de monoteistaj religioj, kiuj estas utilaj por savi la pacon.

GRAVA EKUMENA renkontiĝo estis organizita en Mangochi - Malavio -. Mons. Assolari, apostola administranto, adresante sian saluton al la partoprenantoj, akcentis la gravecon de la dia ordeno, kiu volas, ke ĉiu klopodu por la unueco de la eklezio. La ekumena seminario, bone organizita de la nacia katolika sekretariato de Malavio, kunvenigis, krom la apostola administranto, kvin katolikajn episkopojn, plurajn diocezojn reprezentantojn, membrojn de episkopaj komisionoj kaj reprezentantojn de interkonfesiaj organizoj. La katolikaj oratoroj, kiuj viciĝis dum la laboroj, prezentis vastan tutrigardon pri la progreso de ekumenismo en Malavio je loka kaj nacia nivelo. Apartaj grupoj disvolvis la temojn de bapto, miksedziĝoj kaj interkomunio. El la protestanta flanko estis montrita la vidpunkto de la kristana Konsilio pri ekumenismo, kaj estis prezentita la evoluo de la agado ĝis nun realigita en ĉi tiu kampo fare de la evangeliaj eklezioj. La seminario donis eblecon al karitataj kaj kuracaj institucioj kunigi klopodojn kaj organizi agadojn laŭ ekumena spirito. En la ferma kunsido la episkopo de Zomba, mons.

Chimole, dankis la organizintojn kaj partoprenantojn, esprimante deziron, ke la fervoro, kiu karakterizis ti un renkontiĝon donu ankoraŭ siajn fruktojn por plumar ŝi laŭ la vojo indikita de Kristo: "por ke ĉiuj estu unu en li".

EN ATBARO, Etiopio, mortis en la aĝo de 91jaroj, p. Deferino Casterili, dekanio de misiistaj kapucenoj en la mondo. Li naskiĝis en la provinco Como en Italujo. Etiopion li alvenis en la jaro 1911a. Dum 61 jaroj da misiista vivo li revenis Italujon nur unu fojon por kuracado. Dum la multjara sacerdota laboro li okupadis diversajn postenojn kaj estis konata en la lando pro l'vasta animpaŝtista agado kaj imitinda sacerdota vivo. Multaj misiistoj kaj sacerdotoj etiopaj konsideris lin sia spirita patro.

(Fr.Walas)

EN UGANDO la muzulmana prezidento de la Respubliko Idi Amin Dada deklaris, ke la 3a de junio, la festo de la Martiroj, estos ekde nun nacia festo, kiel la 1a de junio, rememoriganta la institucion de la Plej alta Islama Uganda Konsilio. La prezidento anoncis ankaŭ nacian loterion por akiri la fundojn necesajn al la kompletigo de la sanktejo honore al la Martiroj. Li persone donis tiucele 12.500 dolarojn al la ĉefepiskopo de Kampala, mons.Nsubuga, kaj sian junian salajron.

ONI ANONCAS baldaŭan aperon de la katolika brazila jarlibro. Por ĝia pretigo la Centro pri religia statistiko laboris kvin jarojn. La volumo, kun siaj 2.000 paĝoj, donos ĉiujn dezireblajn informojn pri la agadoj de la eklezio en Brazilo kaj pri la personoj dediĉitaj al animzorga laboro. El ĝi oni informiĝas, ke la sacerdotoj estas 13.292, kaj 242 inter episkopoj kaj respon

deculoj pri ekleziaj distriktoj, kiuj estas 206. 5.433 estas la parokoj. 329 la virinaj religiaj institutoj kaj 115 la viraj.

LA PAŜTISTA celo de la liturgia plurismo estis ilustrita en la Paco - Bolivio - de mons. Samuel RuizGarcia, prezidento de la Sektoro de CELAM (KoncilioEpiskopa Latin-Amerika) por la misioj. Mons. Ruiz Garcia, kiu en la bolivia ĉefurbo gvidis kunsidon de la organizo de li estrata, parolis pri neceso gardi ankaŭ en la liturgia kampo la kulturajn valorojn de la diversaj popoloj. Li substrekis aparte, ke montriĝas per multaj indicoj, ke en la Latina Ameriko la indianoj pli kaj pli ekkonscias pri la kulturaj valoroj, kies ili estas portantoj, postulante, ke ankaŭ la liturgio respektu ilin. La episkopo laŭdis la iniciatojn por konkretigi ĉi tiujn aspirojn, admonante tamen la liturgiajn movadojn, ke ili kontaktu zorge inter si por kunordigi ĉiam sian laboron.

LA APOSTOLA DELEGITO en Jerusalemo, mons. Lino Laghi ĵus presigis valoran verkon titolitan: "Jarlibro de la Katolika eklezio en Sanktlando 1972a". Ĝi enhavas ne nur informojn pri la eklezioj de la latina patriarkato, sed ankaŭ pri ĉiuj aliaj eklezioj de Israelo, Jordanio kaj Cipro, kuniĝintaj kun Romo: teritorioj, kiuj dependas de la apostola delegacio de Jerusalemo. En la enkonduko mons. Laghi rimarkas: "Neniam, kiel nuntempe Sanktlando altiris la atenton de la katolika mondo, kiel pruvas la alfluo pli kaj pli kreskanta da pilgrimantoj. Ĉi tiu movado ricevis decidan impulson de la pilgrimado, en 1964a, de Paŭlo 6a, la unua papo, kiu venis en Sanktlandon honori la memoraĵojn de nia Savanto. Estas la unua fojo, ke aperas tia verko. Ĝi montras resume ĉion, kion oni fa

ras en Sanktlando laŭ katolika plano. La broŝuro komenciĝas per la listo de la apostolaj delegitoj en Sanktlando. Prezentas poste la diocezojn. Honorlokon havas la latina patriarkato, kies parokoj, entreprenoj kaj lernejoj estas indikitaj de la 1948a ĝis nun. Troviĝas klarigoj pri la greka-melkita-katolika eparkio de Galileo, de Transjordanio, la vikariato greko-melkita-katolika de Jerusalemo, la komunumoj katolikaj maronitaj, siriaj, armenaj, kaldeaj kaj koptaj. Dua ĉapitro estas dediĉita al la religiĝiaj komunumoj laŭ ordo de ilia alveno en Sanktlando. Inter la 19 viraj institutoj estas unu aloke la "franciskanaĵo" por la gardo de Sanktlando" kiuj, alveninte en 1333a, havas nun 180 religiulojn en 32 domoj. La virinaj religiĝiaj institutoj estas 42, kaj estas organizitaj, freŝdata novaĵo laŭ "Unuiĝo de la religiulinaj en Sanktlando". Ĝi havas nun du sekciojn, unu por Israelo kaj unu por la Cisjordanio, kies komuna prezidanto estas mons. La ghi. La tria ĉapitro prezentas la edukiĝajn kaj asistantajn institutojn, kiuj entenas bibliajn institutojn, seminariojn, elementajn, mezgradajn kaj profesiajn lernejojn, orfejojn, hospitalojn kaj dispensariojn. La kvara ĉapitro estas dediĉita al fakaj institutoj. Post nova prezentado de la "Franciskana Gardo de Sanktlando" oni tie montras la "Instituto de la Sankta apostolo Jakobo", kreita post la fondo de la Israela ŝtato por helpi la kristanojn ne-arabajn kuniĝi en vivanta komunumo, por preĝi en la hebrea lingvo, kaj por kontribui plenumi la pli ol miljaran sulkon, kiu disigis la judan mondon disde la kristana. Ĉi tie estas ankaŭ revuitaj la pluraj organizoj por la rifuĝintoj, kiel la papa komisiono por Palestino, la "Catholic relief services-USCC", la Domo de Abrahamo kaj la servoj de "Caritas". En apendico du paĝoj estas dediĉitaj al la ekumena instituto por teologiaj studoj, de Tantour. La

kvina ĉapitro rilatas la "sanktaj lokoj", kiuj distingiĝas laŭ: "sanktaj lokoj" apartenantaj al katolikoj, aŭ kune al latinoj kaj ortodoksuloj; sanktaj lokoj kie la katolikoj havas nur kelkajn rajtojn; ortodoksaj sanktaj lokoj. Tiel je la unua fojo en la historio, per ĉi tiu verko oni havas plenan vidaĵon pri la eklezio en Jerusalemo.

(v. ankaŭ por pliaj informoj tion, kion ni raportis pri Sanktalando en majo, p.118a).

ESTAS KONATE, ke la turkoj ne rigardas favorokule la ĉeeston de la grek-ortodoksa patriarko en sia teritorio. Plurfoje, fakte dum ĉi tiuj lastaj jaroj, oni ekzamenis eblecon forpeli lin de Turkujo. La morto de Atenagoro, se donis bonan ŝancon por efektivigi ĉi ti un projekton, fakte nenion ŝanĝis. La nova patriarko estis elektita kaj enoficigita sen incidentoj, kvankam la loka gazetaro luktadis por lia forpelo kaj iu parlamentano proponis debaton tiucele. Se la elekto post la morto de patriarko Atenagoro sukcesis tre rapide, malgraŭ la veto-o antaŭmetita de la turka registaro pri la plej probablaj kandidatoj, tamen la minaco, kiu pezis sur la patriarka trono devis doni ne malgravajn zorgojn. Tia nova entronigo donis pluan motivon al la turka gazetaro esprimi al la novelektito sian malfidon kaj kontraŭecon al la persono mem kaj ankaŭ al la institucio. Malmultaj estis tiuj, kiuj bondeziris al la nova patriarko, ke li povu efike agadi favore al la bonaj rilatoj inter la komunumoj kaj por la paco. La plej parto de la ĵurnaloj sin limigis al duboj kaj al timoj, atendante, por doni sian juĝon, ke li montru siajn intencojn kaj agadojn. "La tasko de la nova patriarko - skribis iu modera ĵurnalo - ne estos certe facila. Efektive, se li povus loĝi kaj labori for de Turkujo, li ver

ŝajne havus pli favorajn kondiĉojn".

ENCIKLOPEDIA de la hinda kristanismo, titolita "St. Thomas Christian encyclopedia of India" estis realigita de kristanoj katolikaj, ortodoksaj kaj protestantaj de la lando. Publikita okaze de la ĵusaj celebradoj por la deknaŭa jarcento de la martiriĝo de la apostolo sankta Tomaso, la volumo estas rezulto de kvarjara laboro kaj de intensa ekumena kunlaborado. Celo de la verko estas montri la multajn aspektojn de la kristana kredo en Hindujo.

UNU EL LA PLEJ FEKUNDAJ preĝejo - konstruaĵo estis en Hindujo Srivai Gnanapragasan, kiu modeste kaj silente en la du hindaj ŝtatoj de Tamilnadue kaj Kerala starigis por la jesuitaj misiistoj sepdekon da preĝejoj, inter kiuj katedralojn, krom kolegiojn, kiel la faman universitatan "Loyala College" de Madraso, seminariojn, episkopajn rezidejojn, monakejojn, lernejojn. Kvankam li devis utiligi por ĉi tiuj kompleksoj materialojn ne ĉiam taŭgajn, li ambiciis sin inspiri al eŭropaj modeloj, laŭ romanika, gotika, araba, renesanca stiloj. Inter ĉi tiuj la gotika estis de li preferata; sed dum la lastaj jaroj li komencis sekvi la hindan stilon, tiel obeante la direktivojn de la eklezio. Admirante la belan katedralon de Madurai, iu franca arkitekto ne volis kredi, ke ĝi estis kreita de hinda artisto, kiu eĉ havis neniun diplomon pri arkitekturo, ĉar li ĉe neniua akademio faris regulajn kursojn. Guanapragasan fermis sian ekzemplodonan kaj senlaca vivon entute dediĉitan al servo de Dio, la 16an de junio 1970a. La jarlibro de la Societo de Jesuo menciis lian modestan figuron inter unu el siaj neforgesendaj bonfarintoj.

•••••
•
•••••